



3*1993*156

STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Sonja Zedníková

La alia geometrio

(Kion mi vidis en la ekspozicio de bildoj)

Kiam nigro falos en blankon
kio okazos?
Kiam nigro falos en bluan
ĉu ĝi bluiĝos?
Kiam nigro falon surteren
ĉu la planko nigriĝos
kaj nigriĝos la tutan mondon?

La surdaj ne aŭdos
la blindaj ne vidos
la lamaj ne iros ien

Sed kiam nigro falos supren
estante elĵetita
kaj elflugos al ĉielo
al nuboj
al blanko
al la lumo de prismo
de la diafragmo
al koloroj de suna ĉielarko
tiam la gutoj disperiĝos
diseriĝos
disiĝos
kaj vibros en ĉiuj koloroj de la mondo

Surduloj vidos la mondon
blinduloj iros sur ĝi
kaj lamuloj ĝin aŭskultos

He, kio estas en la supro?
Ĉu vi scias?
La vento blovos
la tubo en la freneza danco ŝvelos
la tubaro sin levos
sur la karuselo
de la blovanta vento

Kaj malsupre staras persono-hometo
diagonalo en kubo
kaj perceptas palpe:
la alia geometrio

1991-02-12

Pri kongresa urbo Karlovy Vary

HISTORIO KAJ LEGENDO

La teritorio, kie troviĝas la varmaj akvofontoj jam de la ŝtonepoko, estis iom-post-iome setlata de pratempaj loĝantoj, keltoj, slavoj kaj germanoj. Ekde la jaro 1240 estis la nuntempa regiono de Karlovy Vary administrata de la bohema ordeno de kruculoj kun ruĝa stelo, kiun fondis la sankta Agnesa. En la 14-a jarcento ĝis la teritorio de Karlovy Vary etendiĝis la reĝa arbardistrikto de Loket.

Kaj ĝuste ĉi tien laŭ legendo venis ĉasi kun sia akompanantaro la bohema reĝo Karlo IV. Unu el la ĉashundoj ĉe persekutado de cervo saltis de roko en akvon, kiun la pelata besto facile transsaltis. La hundo komencis hurli pro doloro. La ĉasantoj alrapidis opiniante, ke la hundo estas vundita, sed la vidaĵo ilin tre surprizis: el la akvo, en kiun falis la hundo, leviĝis vaporo - la akvo estis varmega. La saĝa reganto antaŭvidis la kuracan povon de la akvofonto, banis en ĝi vunditan kruron, resaniĝis kaj baldaŭ ordonis, ke la tuta loko, kie oni trovis la miraklajn akvofontojn, estu setlata. Tiel rakontas la legendo.

KAJ LA VERA HISTORIO?

En la jaro 1325 estiĝis vilaĝo Vary, kiun konsistigis 40 domoj. Ĉirkaŭ 1358 Karlo IV konstruigis tie ĉaskasteleton, kaj la vilaĝon li altrangigis al urbo, al kiu li en 1370 donacis privilegiojn de libera reĝa urbo. Tiam la urbo estis nomata Varmaj Banoj apud la urbo Loket. Venceslao IV komence de la 15-a jc. donis al la urbo pluajn privilegiojn: en la teritorio de la urbo oni ne

portis armilojn, ne estis persekutataj krimuloj, estis tie konservata trankvilo kaj paco. La urbo estis malfermita, sen fortikaj muregoj - alirebla por ĉiuj. Jam tiam, kiel estas skribite, ĝi estis gastama...

En 1522 estiĝas la unuaj banejoj, ekde 1531 la burgrafo de Loket enkondukas enirpagojn. La disfloriĝon de la urbo haltigis nek grandaj inundoj en 1579 kaj 1582, nek incendio forbruliganta precipe lignajn konstruaĵojn en 1604. Antaŭ la jaro 1604 tie funkciis ĉirkaŭ 200 privataj banejoj.

La centroj de la tiama Karlovy Vary (= *Banejoj de Karlo*) estis la ŝprucfonto (en 1508 konstruita) kun publika banejo, kaj foirejo kun kasteleto. En 1623 la urbo akiras privilegion, t.n. Salva guardim, kiu ĝin liberigas de tramarŝoj kaj loĝadoj de armeaj trupoj. Kaj la jaro 1628 alportas pluajn privilegiojn kaj posedaĵon - 8 kortegojn kaj vilaĝojn. Inter 1640 kaj 1647 ekfloras metioj, precipe kudrilistoj, stanistoj, fusilistoj, vaflistoj kaj bakistoj.

Komence de la 18-a jarcento estis Karlovy Vary malgranda urbeto ĉirkaŭ la ŝprucfonto, sed en la dua duono de la sama jarcento jam efektiva banurbo. Fondiĝas unuaj gastejoj, estiĝas unuaj restoracioj kaj hoteloj. En 1756 estas establita promenejo super reguligata kaj kaŝtanborderita bordo de la rivereto Teplá (= Varna). Komence de la 19-a jarcento oni konstruas ŝoseojn direkte al Prago, al Mariánské Lázně (= Maria-Banurbo), al Loket. Finiĝas la erao de ŝindaj tegmentoj. En 1807 estas fondita produkto de stomaklikvoro.

Dum en 1821 venis nur 2000 vizitantoj, en 1874 jam dudek mil. Restadon de eminentuloj

rememorigas multaj memortabuloj kaj monumentoj.

Fine de la 19-a jarcento estiĝas porcelanfabrikoj, vitrofarejo, komence de la 20-a jarcento estis konstruita plenejo de akvoj kaj entrepreno por fluidigo de karbona duoksido. Sur la rivereto Teplá konstruiĝas digo. Kreskis novaj vilao-kvartaloj.

Nun en la urbo loĝas proksimume 60 mil loĝantoj kaj dum la tutjara funkciado alternas ĉi tie proksimume la sama nombro da vizitantoj.

KURACAJ PROCEDUROJ

Kuraca trinkado

La ĉefa proceduro, por kiu la gastoj nun vizitas Karlovy Vary, estas kuraca trinkado. Oni regule trinkas mineralan akvon, kies kvanton kaj fonton rekomendas kuracisto.

Akvaj proceduroj

La plej famaj banoj estas la eferveska, la karbonoksida kaj la joda.

Ĉe la eferveska bano en varma kirliĝanta akvo oni faras mikromasaĝon de la haŭto kaj de la subhaŭto, per premita aero tra iranta la t.n. eferveskigilo.

Ĉe la karbonoksida bano en minerala ŝprucfonta akvo kreskigas solvita karbona duoksido (CO₂) trasangigon de la haŭto kaj subhaŭto.

Ĉe la joda bano oni ingrediencas la mineralan akvon per kalia jodido, ar la jodo favore efikas kontraŭ problemoj de artikoj kaj de la spino.

Ĉe la banoj per diversvarmaj akvoj (verŝado, prucado) estas atingataj favoraj reagoj de la organismo. Pli oni povas submetiĝi al bano en kirliĝanta akvo, al subakva masaĝado, al inhalado, al irigacio de dento-karno.

Plastroj

Plastroj parafinaj kaj limaj travarmigas kaj trasangigas dolorajn lokojn. Kosmetikaj plastroj efikas favore sur la haŭton.

Masaĝoj

Klasika estas la permana masaĝo, kiu renovigas nutradon de la histoj kaj absorbadon de akcesoraj restaĵoj post digestado. La refleksa masaĝo estas ankaŭ permana masaĝo, kiu influas la refleksajn kanalojn en la haŭto, subhaŭto kaj en muskoloj. La subakva masaĝo estas tre agrabla masaĝo per ŝprucado de akvo sub premo en akva medio.

Pneŭmopunkturo

estas metodo, ĉe kiu estas aplikata la karbona duoksido (CO₂) en malgrandaj dozoj sub la haŭton en ĉirkaŭo de akupunkturaj punktoj.

Elektrokuracado

Kuracado per ultrasono - aplikigas efikojn mekanan, kemia, terma kaj biologia precipe sur mova aparato de la korpo. Diodinamikaj kurentoj utiligas la analgezikan efikon de malaltfrekvenca kurento. La Stagnerbano estas galvanizado de la tuta korpo. Diatermio estas termokuracado per altfrekvenca kurento.

Indikoj por bankuracado en Karlovy Vary

Temas pri tri tipoj de malsanoj:

1. malsanoj de la digesta aparato
2. malsanoj metabolaj - diabeto, obezeco, perturboj de la metabolismo de grasoj, podagro
3. malsanoj de la mova aparato de la korpo

(laŭ la kongresa libro)

ESPERANTO EN KARLOVY VARY

Pri la ekesto de esperantista klubo informas la 8-a numero de la gazeto Esperantista/1946 sur la paĝo 83, ke la fonda kunveno okazis la 17-an de septembro 1946 en la klubejo de la kafejo *Pasáž* en Karlovy Vary je la 20-a horo. La kunvenon malfermis la plej aĝa samideano R. Emmer, kiu estis ankaŭ elektita kiel prezidanto. La regulaj kunvenoj okazis ĉiumarde de la 18-a ĝis la 20-a horo en la klubo en la banloka domo "Kosmos", kie estris la nove elektita kluba prezidanto. Tri kursojn en semajno gvidis s-anoj Malík, Zvěřina kaj Jermáš.

Ekde tiu tempo la gazeto alportadis regulajn informojn pri la agado de dudeko da samideanoj kaj iliaj gastoj. Ekzemple en septembro 1948 prelegis vojaĝ-esploristo Josef Pech pri Palestino kaj Egiptio. La klubo aranĝis someran Superan kursaron 1949 kaj 1950 (tri sinsekvaj dusemajnaj kursoj) kaj okaze de la Supera Ekzameno (julio 1949) en barokstila preĝejo koncerton (orgenis Ota Čermák, violonis kuracista kvarteto de Karlovy Vary, kantis Věra Borská kaj vira ĥoro HLAHOL). Post du semajnoj (fine de julio 1949) la klubo honoris gastojn nederlandajn, flandrajn kaj francajn per koncerto de simfonia orkesto. En 1950 ekzamenis en supera kurso famaj esperantistoj Stanislav Kamaryt, Rudolf Hromada kaj MUDr. F. Vaněk. Konservigis ankaŭ invitulo al a 1-a **esperantista balo** en januaro 1950 kun scenetoj el Sekspira komedio "Kiel pla as al vi". Prezentis ilin Karel Höger kaj Z. Procházková, eminentaj profesiaj aktoroj el Nacia Teatro de Praha. Por la jaro 1951 estis eĉ planata la 9-a asocia kongreso de esperantistoj, sed fine ĝi jam ne okazis.

Informoj pri la agado de la klubo post likvido de la asocio en 1953 mankas, ĉar el nunaj membroj neniu memoras tiujn tempojn. En lastaj dek kvin jaroj (post la renovigo de la asocio en 1969) esperantistoj de Karlovy Vary klopodis fari ĉion, por ke estu pli konata la regiono, Esperanto kaj ankaŭ fari ion por reciproka interkonatiĝo kun najbaroj.

Proksimume antaŭ dek kvin jaroj naskiĝis ideo aranĝi serion da renkontiĝoj, dum kiuj ni povus al partoprenantoj rakonti pri nia urbo, kiu dum pli ol 600 jaroj ravigadis vizitantojn, inspiradis poetojn, pentristojn kaj aliajn artistojn por ilia verkado.

Sed ne nur la urbo Karlovy Vary estas loko belega kaj serĉata. Ĝi troviĝas sub deklivoj de la okcidenta parto de montaro - montaro ankaŭ sufiĉe konata kun la nomo Ercmontaro. Famigis ĝin diversaj ercoj, ĉefe stano kaj arĝento, kiuj estis ekspluatataj jam en la 16-a jarcento. Ercmontaro grave rolas en historio de du najbaraj statoj, de du najbaraj nacioj - Ĉeĥoj kaj Germanoj.

Ĉio ĉi inspiris la esperantistojn en Karlovy Vary kaj la 9-an de junio 1979 okazis la **Unua Renkontiĝo en Ercmontaro** en la urbeto Merklín. Aŭtune 1979 sekvis la dua renkontiĝo, kiun partoprenis ankaŭ esperantistoj el la tiama GDR Paul kaj Trude Thomas el Auerbach kaj Philip kaj Ruth Grimm el Ellefeld. Ili diskonigis nian intencon aranĝi ĉiujare Renkontiĝojn de Ercmontaraj Esperantistoj (REE).

La trian renkontiĝon en 1980 jam vizitis pluraj germanaj esperantistoj, sed ankaŭ poloj kaj du partoprenantoj el Sovetio. La internacieco naskigis la unuan kontrakton pri la kunlaboro kun E-klubo en la germana ercmontara urbo Schwarzen-

berg kun interkonsento pri ĉiujaraj renkontiĝoj sub la nomo ITREE (Internacia Turisma Renkontiĝo de Esperantistoj en Ercmontaro).

Efektiviĝis pluaj renkontiĝoj, en Merklin (1981), en Schwanzerberg (1982) en Nové Hamry (1983), en Johann-Georgen-Stadt (1984) en Vítkova Hora (1985), en Antonshöhe (1986), en Radošov (1987) en Antonshöhe (1988), en Boží Dar (1989), denove en Antonshöhe (1990) kaj Nové Hamry (1991)

En 1990 la kluboj en Karlovy Vary kaj Schwarzenberg pritrakitis pluan kunlaboron, tamen la 14-a ITREE estis la lasta, ĉar ĝin ne ĝisvivis la ĉefa organizanto Rudi Eichler, prezidanto de Esperanto-klubo en Schwarzenberg. Nova komuna aranĝo de ĉeĥaj kaj germanaj esperantistoj estas la ĉijara kongreso en Karlovy Vary.

Alena Klementová

SALUTVORTOJ DE LA PREZIDANTO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

Karaj kaj estimataj gekongresanoj, estas por mi granda honoro povi alparoli vin okaze de la 1-a komuna kongreso de du najbaraj Esperanto-Asocioj, nome de la Ĉeĥa kaj la Germana. Temas pri historia evento, kiel ĉiu komuna kultura aranĝo de niaj du nacioj, kiuj en la historio travivis ne nur bonajn kaj amikajn, sed ankaŭ tre malbonajn, eĉ terurajn rilatojn kaj spertojn. Mi certas, ke nia kongreso, kiu montras ne nur ambaŭflanke bonan volon kunlabori, sed ja vere efektivan realigon de tiu bona volo, fariĝos neforgesebla por ni ĉiuj. Ke ĝi startigos novan epokon de niaj rilatoj, kiuj inter ni, esperantistoj, jam longe estas amikaj kaj vere samideanaj. Ni ne nur komune kunsidos, ĝuos la

kulturon en Esperanto, fake traktos kaj ekskursos, sed ankaŭ planos pli efikan kaj pli proksiman kunlaboron celantan al evoluigo de niaj karaj Esperantaj lingvo kaj kulturo. Ke Esperanto vere agu - en la serĉo de nia kongresa temo - kiel vera ŝlosilo al niaj najbaroj: al la najbaraj esperantistoj, kulturoj, kutimoj, popoloj...

La ideo de la komuna kongreso de GEA kaj ĈEA ekformiĝis jam antaŭ 2 jaroj, do longe antaŭ ol ni povis imagi disdividon de Ĉeĥoslovakio en du memstarajn ŝtatojn. Mi aludas pri tio por emfazi, ke neniukaze temas pri forigo de niaj tradicie bonaj rilatoj kun Slovakia Esperanto-Asocio, kaj Slovakaj esperantistoj, kun kiuj ni daŭrigas nian kunordigatan kunlaboron. La amikeco kun unu najbaro ja ne signifas devon ĉesi la amikajn rilatojn kun la ceteraj.

Tiumomente mi ne povas ne menci, ke krom kun Slovakia kaj Germana Esperanto-Asocio nia asocio ekhavis la kontraktan pri kunlaboro kun la Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino. Mi mem estis antaŭ tri jaroj membro de nia tripersona delegacio, kiu partoprenis ilian jarkunvenon, kie ni traktis pri la estonta kunlaboro. Ĝi tamen jam ne povis esti realigata. Permesu al mi, ke mi ĉiokaze rememorigu niajn suferantajn samideanojn de Bosnio esprimante mian bedaŭron pri la teruraj eventoj en ilia lando kaj samtempe deziron kaj esperon, ke en tiu komplika kaj belega lando baldaŭ denove pace kaj harmonie kunvivu ĉiuj hejmaj nacioj, kiel mi spertis dum mia vizito de ilia Esperanto-kongreso.

Mi deziras al vi ĉiuj, kiuj partoprenas la kongreson, sed ankaŭ al tiuj, kiuj ne povis veni, ke floru eterne niaj amikaj najbaraj rilatoj pere de

Esperanto en estonteco pli kaj pli.

Ing. Petro Chrdle

SALUTVORTOJ DE LA PREZIDANTO DE GERMANA ESPERANTO-ASOCIO

Saluton, karaj partoprenantoj de la unua komuna kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj Germana Esperanto-Asocio.

El germana vidpunkto tiu kongreso jam estas rimarkinda, ĉar ni denove post pli ol 15 jaroj kongresas kune kun najbara asocio kaj ekkaptas bonan tradicion el la sepdekaj jaroj. Historian dimension ĝi gajnas pro la fakto, ke ĝi estas la unua komuna kongreso kun orientata najbaro.

Neniu dubas ke ĝin ebligas la gravaj politikaj ŝanĝoj en Eŭropo dum la lastaj jaroj. Sed tio ne sufiĉas, devas aldoniĝi alia bonŝanco: la GEA-politiko rigardi Eŭropon pli granda ol nur la tiama Eŭropa Komunumo rekte kondukis al kontrakto pri partnereco kunlaboro, subskribita de ĈEA kaj GEA jam pentekoston 1989 en Kronach. Sekve niaj du asocioj malrapide sed kontinue alproksimiĝis. Ni rigardu tiun kongreson kiel kulmino sed ankaŭ kiel komenco por pli baza, pli vasta, pli demokrata interpopola kunagado.

Kontraste al la "oficialaj" lingvopolitikaj konceptoj ni posedas taŭgan ŝlosilon al ĉiuj najbaraj landoj kaj certe la forfalo de la fortaj bariloj meze de Eŭropo helpas nin, eĉ se la ekonomia situacio komence iom kovras la ŝancojn.

Principe pli malaltaj limoj signifas pli da interhomaj kontaktoj, pli da vojaĝoj, kaj, ekonomie, ekzemple pligrandiĝon de nia libromarkato. Per interŝanĝo de la diversecaj spertoj de niaj du asocioj ambaŭ povas bone profiti.

Esperantistoj devas esti atentaj, ke ili uzu la ŝancon

kaj evitu la establigon de novaj ĉu naciaj ĉu ekonomiaj limoj. Kie limoj ekzistas, ni serĉu la truojn kaj forigu la barilojn.

Germanoj kaj Ĉeĥoj iam devas esti konsciaj pri la historio de niaj popoloj, kiu montras ankaŭ nigrajn makulojn. Sed el tiu konscio rezultigu forta reciproka volo de interkompreniĝo, komprenemo kaj toleremo. Jen nia devizo, en ambaŭ sencoj de la vorto.

Mi dankas al niaj Ĉeĥaj gastigitantoj por la invito kaj por la bona preparo de tiu ĉi kongreso. Al ĉiuj gekongresanoj mi deziras neforgeseblajn tagojn en Karlovy Vary, interesajn novajn spertojn kaj fruktodonaĵojn. Mi ĉefe esperas ke post tiuj tagoj ĉiuj povas grandigi la liston de siaj amikoj en Germanio respektive en Ĉeĥio. La bazo de interpopola amikeco kaj sekve de la paco estas la amikeco inter la unuopaj homoj.

d-ro Wolfgang Schwanzer
prezidanto de GEA

RAPORTO PRI LA AGADO DE ĈEA EN LA PERIODO INTER ĜIAJ 6-A KAJ 7-A KONGRESOJ

1. Konkize pri la evoluo de la membronombro ekde la 5-a kongreso 87 (OL) - eŭforia kresko kun vigligo de la agado kaj postrevolucia malkresko.

2. Influo de la nuntempaj ekonomiaj kondiĉoj:

- malkresko de la membraro
- kresko de la intereso pri profesiaj taskoj kaj entreprenado kun rezulto al hobiaj ĝenerale
- malkresko de intereso pri la Esperanto-literaturo
- granda altiĝo de ĝiuspecaj kostoj (luprezoj, energio, vojaĝado, poligrafia industrio ...)

3. metodoj de defendo kontraŭ nomitaj negativaj influoj al la agado:

- pliperfektigo de informfluo direkte al niaj membroj (regula aperigado de Starto kaj ĝia aktualigo anstataŭ antaŭaj paralelaj Informoj por funkciuloj)
- jarlibro de ĈEA - resumo de la plej aktualaj informoj du-lingve
- laboro direkte al infanoj ene de la fondita infana sekcio, gazeto porinfana "RINGO", ...
- pli modesta administrad-vivo (komuna uzo de niaj ĉambroj meze de Prago kun esperiga vojaĝoficejo), esperoj kaj ia realaĵo:
- anstataŭ ke ili subtenu nin, ni subtenis ilin - malbona heredaĵo, kiun ni postlasas al novaj funkciuloj
- kupon-privatigo kaj ĝia uzo por fariĝi akcio-posedantoj en estonteco - por plibonigo de la ekonomiaj kondiĉoj en estonteco ni nun devis investi kaj ankoraŭ investos ĉijare. Dankon al tiuj, kiuj tiamaniere subtenas nian movadon.

- nepopulara, tamen nepra paĝo: altigo de la kotizo

4. La plej gravaj eventoj en koncerna periodo: 1991: IFEF-kongreso en Olomouc; 1992: Antaŭkongreso en Prago al la 77-a UK; 1993: ĝuste okazanta komuna kongreso de ĈEA kaj GEA

5. Faka agado - koncentrita en sekciojn de ĈEA:

- scienc-teknika, fervojista, medicina, pedagogia, ŝaka, de esperantaj-protektantoj, mineralogia, naturprotekta;
- junulara, infana, veterana, kristana, katolika, de handikapitoj, de nevidantoj

6. Kunlaboro kun aliaj E-organizaĵoj:

- UEA: malalti o de la membro-nombro (ŝajne pli ol reale)
- intereso de UEA organizi UK en 96 en Prago
- SEA - kunordiga komitato ne

finis sian gravecon pro disfalo de la respubliko, eĉ male

- regiona agado - ĵus kunordiga kunveno en Poprad (CZ, SQ, H, PL) - rezultoj

- TEJO, IFEF, ILEI, IKUE, KELI, ISAE, kaj ceteraj, kunlaboro kun kernaj sekcioj de ĈEA

- duflankaj kontraktoj: krom SEA ni havis kontraktojn pri kunlaboro kun GEA + GDREA kaj EL BkH (la lasta pro bedaŭrinda situacio finiĝis antaŭ la komenciĝo)

- jure memstara iama sekcio de handikapitaj esperantistoj

7. Kunlaboro kun neesperantistaj organizaĵoj:

- AIS/CAIS - kunlaboro dum fondo de Ĉeĥa filio de AIS, sekva kunlaboro

- Ministerio pri kulturo: ŝanĝo en oficialaj rilatoj, bonaj rilatoj daŭras (subteno de la antaŭkongreso kaj de tiu ĉi kongreso)

- ĈSD, FISAIC - E-klarigoj en la horaro, subteno dum preparo de la IFEF-kongreso, nun mi esperas, ke iu transprenos mian rolon de neformalaj kontaktoj kun la ĝenerala direkcio de ĈD

- MŠMaT, Radikala partio: kunlaboro pro ekonomiaj kialoj

Profesiaj privataj firmaoj agantaj pere de aŭ pro Esperanto:

- TEC-CS, Terminologia Esperanto-Centro en Kladno

- Tilio, vojaĝoficejo de inĝ. V.Dvořák (inter alie organizanto de la antaŭkongreso)

- KAVA-PECH, mia privata eduka kaj konsulta firmao, eldonejo kaj vojaĝoficejo

- krom la menciitaj, kiuj regule kunlaboras kun ĈEA ekzistas ankoraŭ jenaj organizaĵoj agantaj en Ĉeĥa Esperantujo:

Kooperativo de esperantistoj INTERHELPO gvidata de Zdenko Křimský
GLOTOINDEX CHALOUPKA J.V.s.o.f. Plzeň

8. Esperanto-fondaĵoj:

ene de ĈEA: - eldona fondaĵo

(fondis in s-ino Milatová)
- fondaĵo RINGO, por subteni la porinfanan agadon (fondis ĝin ĈEA)

jure memstaraj:

- Terminologia fondaĵo
- Panglotia (fondaĵo de J.A.Ko-
menio) - ambaŭ fondis TEC-CS
sub gvido de J. Pospíšil)
- Esperantista Literatura Fon-
daĵo (ELFo) - fondis EK Brno

9. Planoj kaj celoj:

Eldonado de periodaĵoj:

- Starto, Ringo, Sano (eldonas
ĈEA), Bulteno de Brno, Verda
Familio de Mnichovo Hradiště,
Bulteno de EŜLI

Broŝuroj: - Lumo en tenebroj
(biografio de Komenio), Antaŭ-
kongresa libro 1992 Seminario
pri Komenio, Propedeŭtiko,
Faŭsto (pup teatraĵo), Jarlibro
de ĈEA 1992, Fervojistaj kaje-
roj

Tendaroj: Lančov (EK Třebíč),
Ošelín (EK Plzeň), Sebranice
(IKUE)

Starto recenzas:

Marin Bacev: **Kalendaro 1993**,
Sofia 1992, 32 paĝoj,
eldonkvanto kaj prezo ne indi-
kitaj.

Temas pri poemara lernolib-
reto dividita en 12 monatojn-
lecionojn, en ĉiu monato unu
nova vorto por ĉiu tago, do 367
vortoj por la tuta jaro. Aldo-
nita estas ankoraŭ 13-a monato,
januaro 1994. En ĉiu leciono
oni trovos du tri poemojn kun
ilustraĵoj sur maldekstra paĝo,
dekstre la vortojn por la tuta
monato. La vortoj estas elekti-
taj laŭ diversaj temoj kiel
familio, teatro, sporto, bestoj
ktp. Legaĵo taŭga por komencan-
toj, infanoj, sed ankaŭ por
ŝatantoj de poezio en Esperan-
to. Broŝureto estas nur tajpi-
ta, ne kompostita, tamen mul-
topligita zorge kaj bone legeb-
le.

- mm-

el esperantujo

Kantĥoro Haná kaj E-klubo en Olomouc

Vira kantĥoro Haná, honora
membro de Esperanto-klubo en
Olomouc, festis la 40-jaran
datrevenon de sia ekesto per
solena koncerto la 12an de marto
1993. Partoprenis ĝin ankaŭ
reprezentantoj de esperantistoj
el Olomouc kaj en publika gra-
tulo ili akcentigis la longja-
ran kunlaboron kun ĉi tiu kanta-
ĥoro, kiu ĉiam esprimadis sian
intereson pri Esperanto kaj
preparis jam multajn kantpro-
gramojn en ĉi tiu lingvo. Plej
grava estis ilia prezentado
okaze de la kongreso de IFEF
okazinta maje 1991 en Olomouc.

La 2an de majo 1993 festis
sian gravan vivjubileon multja-
ra oferema funkciulino de la
E-klubo en Olomouc s-anino
Alžběta Karásková.

Dr. Vl. Mohapl

ICEM

Klubo de esperantistoj dok-
toro Schulhof en **Parbubice** in-
vitas vin kore por sabato la
17-an de julio 1993 al amika
ICEM-renkontiĝo kun eksterlan-
daj partoprenantoj. En kultura
kaj amuzo programoj sin prezen-
tos junularo, kantoj, muziko-
deklamado, magio kaj folkloro
ensemblo Karmazín. Inaŭguro je
la 13,30 h en la granda salono.
De la fervoja stacidomo uzu
buson n-ro 13 direkte al Dubina
(15 minutoj al la kulturdomo).

ADONIDO - HLAVÁČEK JARNÍ

Interesan turisman aranĝon
preparis esperantistinoj el
Ratiškovice en Moravia Slova-
kio. Dekkvino da personoj marŝ-
is al proksimaj montetoj, kie

kreskas ankoraŭ rara kurac-herbo por kormalsanoj (sed nur post farmacia prilaboro, ĉar ĝi estas forte venena), unuavide simila al leontodo, sed multe pli bela. Ĝis la noktomezo la partoprenantoj gustumis sudmoraviajn vinojn en klasikstila vinkelo amuzante sin per ĉeĥaj kaj esperantaj kantoj kaj anekdotoj. La aranĝo pruvis, ke ankaŭ malgrandaj kluboj kaj rondetoj povas aktive kaj interese labori.

INTERNACIA DEKLAMKONKURSO

En aprilo 1993 partoprenis 3 infanoj kun instruisto el la Esperanto-klubo Znojmo la Internacian Deklamkonkurson en la hungara urbo Pápa. La infanoj el Znojmo bone sukcesis. Partoprenis entute 115 infanoj kaj gejunuloj el Hungario kaj aliaj landoj. La programo estis vere riĉa: sola kaj ĥora kantadoj, komuna ekzercado pri jogo, prelego pri Massayuki-masaĝo kun provo, trarigardo de historiaj kaj kulturaj memoraĵoj de la urbo Pápa, aŭtobusa ekskurso al la montaro Bakonj. Ni trarigardis ankaŭ grandan ekspozicion de bildkartoj el la mondo.

V.R.

KULTURA FESTIVALO EN ÚSTÍ n. L.

Esperantista klubo en Ústí nad Labem aranĝas de la 1-a ĝis la 3-a oktobro 1993 tradician kulturalan festivalon kun bunta programo. Vendrede: interkona vespero; sabate: prelegoj, turisma ekskurso dediĉita al Napoleona batalo proksime de Ústí nad Labem en la jaro 1813 (130-a jubileo); granda kultura vespero (kantado, deklamado ktp.); dimanĉe: historia ekskurso.

Aliĝilojn kaj pli detalajn informojn petu je la adreso: Ing. Josef Kříž, Družstevní 411, 400 07 Ústí nad Labem.

MALGAJA SCIIGO EL OLOMOUC:

La 9an de aprilo 1993 mortis honora membro de la Esperanto-klubo en Olomouc, prof. Václav Stratil. Li estis dum multaj jaroj prezidanto de Patrujscienco muzea asocio en Olomouc kaj li meritiĝis pri tio, ke en ĉi tiu asocio estis fondita speciala laborgrupo okupiĝanta pri historio de la Esperantista movado en regiono de Olomouc.

ĈU MIRAKLO ?

Marde, la 11an de majo, iniciatis Esperanto-rondeto ĉe la klubo de emerituloj en Ostrava-Poruba solenan kunvenon omaĝe de la "Tago de patrinoj" en sia klubejo. Ĉeestis ĝin klubaninoj: patrinoj, avinoj eĉ pr-avinoj. Kantis kaj deklamis por ili infana grupo de proksima lernejo. Poste por tiu okazaĵo elektitaj samideanoj priservadis la patrinojn per "maro de dolĉaĵoj, desertoj kaj fruktoj el sudo" kaj komenciĝis la ĉefa programo, en kiu s-ano Vlado Sládeček kantis kaj rakontis spritaĵojn. Kun akompano de sia gitaro li por ĉiu patrino elektis kaj elpensis ĝustan kanton, ekzemple al estrino de la rondeto, s-ino Lydie Klegová:

*En ĝarden' multaj floroj,
estas eĉ lilio,
sed inter verdaj floroj
belegas Lidio ...*

La amika kunsido okazis tute sen alkoholaĵoj kaj sen fumado. Ĉeestis ĝin ankaŭ reprezentantinoj de la Urba Oficejo, kiu pat-ronas la klubon kaj kiu malava-re finance subtenis la solena-ĵon. Kompreneble ankaŭ ili "ricevis" kanton de s-ano Slá-deček en nacia lingvo, ĉar ili ankoraŭ ne komencis lerni, sed almenaŭ aŭdis "belsonadon" de Esperanto, kiel ili fine

konstatis. Malgraŭ promeso, pro difekto de aŭtomobilo, bedaŭrinde ne ĉeestis urba kabla televido.

Eble nuntempe por multaj esperantistaj rondetoj ĉi tiu rakonto sonas kiel fabelo, sed ĝi pravas, ke eblas kunlabori kun diversaj societoj, kiuj ankoraŭ disponas per iom da mono kaj kiuj emas kaj inklinas subteni ankaŭ Esperanton.

Lydie Klegová

**Slovakia Esperanto-Asocio
invitas vin al
la 12-a Kongreso de SEA**

Meze de junio 1993 (inter la 11-a kaj 13-a) fariĝos Bratislava post 16 jaroj denove la okazloko de la plej supera traktado de esperantistoj el Slovakio. Aliĝojn akceptas Mgr. Alica Komlóšiová, Rovníková 6, 821 02 Bratislava. Kongreskotizo: **120 Sk** aŭ **4 USD** (membroj de SEA: **70 Sk**). Pago por restado (du noktoj, manĝado 3-foje tage) estas **490 Sk** (aŭ 17 USD), por eks-socialismaj landoj **390 Sk** (13 USD).

LA TUTA MONDO LAŬDAS NIN

En la tuta mondo homoj scias pri disigo de Ĉeĥa kaj Slovaka respublikoj kaj ĉiuj estas surprizitaj, ĉar neniu supozis, ke ĉeĥoslovaka federacio disfalos. Sed multe pli grandan surprizon elvokas tute paca maniero de la menciita disigo. En leteroj, kiujn mi ricevas de samideanoj el diversaj landoj, mi legas gratulojn kaj laŭdon de nia ekzempla sukceso, ke ni evitis la sorton de Jugoslavio aŭ de Sovet-Unio.

Samideano el Niĝerio komparas la situacion en nia lando kun situacio en niĝeria federacio, pri kiu li skribas, ke ĝi estas katastrofa. El lia letero mi citas: "Se neniu miraklo okazos, mi antaŭvidas post ne-

longe civitanan militon." Sed ege miriĝis min jenaj vortoj en letero de vaskino el Bilbao: "Vi instruis al ni demokratian lecionon, kion ni certe bezonas." Tio estas surpriza laŭdo por civitanoj de lando, en kiu pli ol 40 jarojn demokratio forestis, do ili nun devas nur lerni ĝin.

Lubomír Středa

REGIONAJ BORSO kaj EKSPOZICIO de poŝtmarkoj, bildkartoj ktp. estas organizataj de filatelistoj en Uniĉov okaze de la 780-jara datreveno de la urbofondiĝo. Bona ŝanco por esperantistoj-kolektantoj prezenti nian movadon antaŭ la publiko. La ekspozicio okazas en la malgranda salono de Integrita Kultura Domo de Uniĉov (Sdružené kulturní zařízení), nám. Osvobození 4, en la tagoj 25.-27.6.1993 inter 8.00-18.00 h kaj la borso sabate la 26-an de junio 1993 inter 7.00-17.00 h en la sama domo.

35 JAROJ DE ESPERANTO EN POLA RADIO VARSOVIO

La 4-an de aprilo 1993 la esperanto-redakcio de Pola Radio eniris la 35-an jaron de la ĉiutaga aŭdigado de radioelsendoj. Oni enkondukis vesperajn novaĵojn je la 22.30 h, ankaŭ dimanĉe, por pli ĝisdate informi pri la okazaĵoj en la naskiĝlando de Ludoviko Zamenhof. Nun la ĉiutagaj elsendoj estas je la **13.30-13.55 h** (9525 7145 6095 1503 kHz) kaj **20.30-20.55 h** (7285 7270 6095 1503 kHz) kaj je la jam menciita **22.30 h**.

La komenciĝo de la 35-a jaro de la laboro igis la Esperanto-redakcion iniciati kelkajn internaciajn renkontiĝojn kun la aŭskultantoj.

Konversacia kurso - Esperanto en funkcioj okazos de la 14-a ĝis la 18-a de junio 1993 en Lappeenranta (Finnlando) kun

3-horaj lecionoj ĉiutage. Oni ne instruos tiom la gramatikon kaj vortprovizon kiel esprimadon, ekzemple de emociaj statoj. Aliĝojn akceptas: Jorma Toropainen, Happtie 2 A 29, SF-53600 Lappeenranta, Finnlando, tel. /9/53-2-33 49.

Turisma konkurso por geaŭskultantoj postuligas respondi ĝis la 15-a de junio 1993 al kutima adreso "POLA RADIO, Esperanto-Redakcio, Box-46, 00-950 Varsovio, Pollando" respondi konkursajn demandojn (kiel premioj servos E-libroj kaj sonkasetoj, la ĉefpremio estas senpaga partopreno en ESPERANTO-TAGOJ en Varsovio kaj Bjalistoko en septembro).

La konkursaj demandoj

1. Kiun urbon aŭ alian lokon de Pollando vi dezirus viziti kaj pro KIO?
2. Kiun lokon (kiujn lokojn, urbojn, regionojn ktp.) de Pollando vi jam vizitis en la pasintaj jaroj kaj kio aparte interesis vin?

UNICEF KAJ ESPERANTO

En novembro 1992 ricevis d-ro Humphrey Tonkin leteron de s-ino Janet Nelson, estrino de NGO-sekcio de UNICEF. S-ino Nelson skribis pri ebleco kaj utileco starigi Konsultan Statuson inter Universala Esperanto-Asocio kaj UNICEF. S-ino Nelson esprimis esperon, ke UEA interesiĝos pri la grava problemo de knabina neegaleco en edukado kaj subtenos tiun kaŭzon pere de siaj membraj geinstruistoj.

(gazeto "esperanto usa" n-ro 1/1993 laŭ raporto en "Novjorka Prismo" de Esperanto-Societo de Novjorko, c/o UEA, 777 UN Plaza, New York NY 10017, Usono)

RADIO PRAHA PRI VERDA STACIO

Radio Praha elsendis en majo, memore al la 70-jara jubileo de la Ĉeĥa Radio, serion "Faŭsteca vizaĝo de Karel Höger". En ĝia kadro, ĉe la komenco de la kariero de la fama aktoro, estis preparolata la Esperanto-elsendoj "Verda Stacio" Brno, partopreno lia kaj de Chalupa, Bezdiček, Kožík, Leraus, Kožíková-Švábíková. Dirite, ke la E-programoj ĝuis grandan atenton eksterlande.

Mi memoras pri elsendo de Radio Praha "Kial Shakespeare nomis Bohemion *reĝolando ĉemara*"; mi havis la honoron dialogi en ĝi dum 20 minutoj kun Karel Höger.

J. Mařík


DENOVE INTERESA FILATELAĴO EL STRÁŽNICE

Ekde 3.5.1993 uzadas la poŝtoficejo en Strážnice, distr. Hodonín, glumarkojn por registritaj sendaĵoj kun porokaza esperantlingva teksto: "KOMUNA KONGRESO de ĈEA-GEA 28. - 31.5. 93".

Pri detaloj oficiale raportas Poŝta Informilo, n-ro 10/1993 el 27.4.1993, paĝo 48, ĉapitro 112. Ĉeĥa poŝto eldonis entute 10.000 ekzemplerojn de la glumarkoj por la poŝtoficejo en Strážnice.

Pluajn informojn vi povas peti ĉe la adreso ESPERANTO, poŝtkesto 36, 696 62 Strážnice.

-vlha-



Esperantologiaj Studoj

ĉe la Filologia Fakultato de la Universitato Eötvös Lóránd Budapest funkcias ekde 1966 dank' al prof. Szerdahelyi kaj post lia morto en j. 1987 gvide de d-inoj Ilona Koutny kaj Zsuzsa Varga-Haszonits. Jam pli ol 80 gestudentoj verkis sian diplom-laboraĵon pri interlingvistiko kaj kelkaj eĉ doktoriĝis.

Esperanto-fako apartenas al la suplementaj fakoj de la Filologia Fakultato: la gestudentoj jam elektis ĉefan fakon kaj ekde sekva jaro povas plie studi esperantologion. Ekzistas tri formoj de studado:

1. **Internacia koresponda esperanto-fako**, malfermata ĉiun trian jaron, entute 6 semestroj po unusemajna restado en Budapeŝto dum semestrofinoj. Necesas supergrada diplomo (min. *bachelor*), bona scio de kaj pri esperanto, akcepta ekzameno. Prezo 500 USD, enskribo inter la 6-10aj de septembro 1993.

2. **Taga esperanto-fako**, ĉiujare malfermata, 2-jara, supergrada diplomo (min. *bachelor*), prezo 1750 USD.

3. **Kompleta universitata formado**, ĉiujare malfermata, 5-jara, taga studado apud ĉefa fako, lernado de la hungara lingvo, abiturienta ekzameno, kotizo 1750 USD, limdato la 15-an de julio 1993.

Adreso: Universitato Eötvös Lóránd, BTK, Internacia Sekretario, H-1364 Budapest, Pf. 107, Hungario. Telefono: 266-3235 aŭ 267-0966/274.

EKKONU LA FAMILION ZAMENHOF

La Turisma Oficejo PENELOPA en kunlaboro kun la Esperanto-Redakcio de pola Radio kaj Esperanto-Klubo de la revuo "Magazyn Domowy - Nowa Wies"

organizas de la 13a ĝis 18a de septembro ESPERANTO-TAGOJN en Varsovio kaj Bjalistoko omaĝe al la familianoj de Ludoviko Zamenhof martire pereintaj en la koncentrejo Treblinka. Nunjare pasas 50-jara datreveno de la sufoko de la insurekcio en la Varsovia Getto. Oni vizitos ankaŭ la Nacian Parkon Bialoweza, la naskiĝlokojn de Marko Zamenhof kaj F. ĉChopin, prelegos pri Lidia Zamenhof, tradukintino de **Quo vadis** k.a. Loĝado en ordinaraĵ hoteloj aŭ en laboristaj hoteloj kaj studentaj domoj. Aliĝoj ĝis la 1-a de aŭgusto 1993 je adreso:

Turisma Esperanto-Oficejo PENELOPA, 00-660 Varsovio, Lwowska 17, lok. 2, Pollando, telefono 21-08-21 (10-17 h en labortagoj).

TEJO-KONGRESO EN VRACA 1993

La aliĝkondiĉoj por la IJK en Vraca ŝanĝiĝis, sed **favore**. La ŝanĝoj koncernas precipe **B-landojn** (Albanio, Bulgario, Ĉeĥio, Hungario, eks-Jugoslavio, Rumanio, Pollando, Slovakio, eks-Sovetio, kaj ĉiuj landoj de Afriko, Latina Ameriko, Azio escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko).

La ŝanĝitaj kondiĉoj, validaj por ĉiuj aliĝintoj kaj aliĝontoj, estas:

* Aliĝintoj en la kategorioj B kaj C el **B-landoj** ĝuas rabaton **\$30**.

* **Ĉiuj** membroj de TEJO ĝuas rabaton de **\$15**.

* **Aliĝintoj el B-landoj** povas aliĝi per **antaŭpago** de minimume la duono de la kotizo, sed ili devas **nepre konfirmi** sian aliĝon ĝis la 30a de junio 1993.

* La aliĝo kaj antaŭpago **transdoneblas** al alia persono (kun alĝustigo laŭ aĝo, lando, kategorio kaj TEJO-membreco).

* * * * *

Jan Werner: Matematika vortaro esperanta-ĉeĥa-germana
Propra eldono, Brno 1990 (adreso: J.W., Kroftova 84, 616 00
Brno, Ĉeĥa Respubliko). 184 paĝoj, formato A5, eldonkvanto
400 pc., prezo 39 Kč.

Matematiko ne estas afero nur de matematikistoj. Oni renkontas aplikadojn de matematiko kaj matematikajn formulaĵojn en diversaj sciencaj kaj teknikaj fakoj. Pro tio tre multaj fakuloj bezonas kaj uzas matematikajn terminojn.

Nuntempe angla lingvo estas la plej multe kaj preskaŭ unu sola lingvo uzata en sciencaj gazetoj. Antaŭ la dua mondmilito oni uzadis ĉefe francan kaj germanan lingvojn. Estas malpli novaj artikoloj en matematikaj gazetoj skribitaj esperante. Dum lastaj jaroj ankaŭ mi partoprenis en internaciaj matematikaj konferencoj kun neniu aŭ preskaŭ neniu partoprenantoj el angle parolantaj landoj kaj ĉiu parolis angle, ĉiu uzanta sian propran, ofte malbonan prononcon. Mi demandis: kial ni ne parolas esperante? Esperanto donas grandajn eblecojn por preciza esprimo kaj diferencigo, kiu estas grava precipe en matematiko. Du ekzemploj: derivado, derivado, derivaĵo; nefinia (infinita), senfina. Ekzistas scienca matematika gazeto (eldonata en Japanio) **Funkcialaj Ekvacioj** kun esperanta titolo, sed enhavanta nur anglalingvajn artikolojn. Ĉi tiu stato estas ankaŭ kulpo de esperantistaj matematikistoj. Ne sufiĉas eldoni kaj legi en esperanto nur gazetojn kun popularaj, kvankam interesaj matematikaj artikoloj. Ĉefa problemo de transdono de sciencaj informoj estas, simpligite dirite, ke neniu verkas esperantlingve, ĉar neniu tiel komprenas, kaj neniu lernas esperanton, ĉar neniu esperantlingve verkas. Esperantistaj matematikistoj devus

skribi fakajn artikolojn ankaŭ en esperanto. poste aliaj fakuloj komencos lerni esperanton kaj uzi ĝin.

La prezentata vortaro de Jan Werner povas tre helpi esperanton fariĝi lingvo de interŝanĝo de matematikaj spertoj. La vortaro enhavas pli ol 3700 terminojn kaj terminajn kunigojn ordigitajn alfabeto laŭ esperanto sekvatajn per ĉeĥaj kaj germanaj ekvivalentoj. Estas videble, ke danke sian larĝon la vortaro enhavas terminojn el ĉiuj fakoj de matematiko. La sekvantaj partoj de la vortaro estas ĉeĥa kaj germana indeksoj. Tiel la vortaro povas servi por tradukado, en kiu ajn direkto kaj estos vere utila por ĉeĥaj kaj germanaj fakuloj kaj por ĉiu, kiu komprenas ĉeĥe aŭ germane. La vortaro ankaŭ helpas stabiligi matematikan esperantlingvan terminologion. Sed mia opinio, la plej granda helpo al esperanto en matematiko estus verkado kaj publikigo de matematikaj artikoloj kaj libroj en esperanto.

Jan Hejzman

TRADICIA RENKONTIĜO EN ĈANTORIA

Filioj de PEA en Katowice kaj en Gliwice volus renovigi laŭ multjara tradicio ĉiujarajn renkontiĝojn de ĉeĥaj, slovakaj kaj polaj esperantistoj.

Tial ili invitas ĉiujn (ne nur el la supre menciitaj landoj) por partopreni la 20-an de junio 1993, t.e. dimanĉe, sur la monto Ĉantoria ĉe la pola-ĉeĥa limo (dekelkaj kilometroj de limtrapasejo Cieszyn) Internacian Esperanto-Renkontiĝon.

La plej malgrandaj florantaj plantoj


Estas bone konate, ke la plej malgrandaj plantoj estas unuĉelaj bakterioj kaj algoj. Sed kiuj estas la plej malgrandaj florantaj plantoj? Ili kreskas ankaŭ ĉe ni, sed oni preterpasas ilin senatente.

Temas pri **lemnoj** (ĉeĥe "okřehky"), malgrandaj plantoj kreskantaj sur la surfaco de akvoj. La tuta planto estas nur malgranda folieto, el kiu kreskas direkte en akvon unu aŭ pluraj radiketoj. La lemnoj rapide plimultiĝas, ĉar el la rando de la folieto elkreskas novaj folietoj, kaj en malgranda tempo estas la tuta akva surfaco kovrata de helverda tapiŝo. Tiun tapiŝon konas tre bone bredantoj de anasoj, ĉar ili prenas ĝin kiel nutraĵon. La floroj de lemnoj estas malgrandaj kaj tre simplaj, nome unu pistilo kun unu ĝis tri stamenoj. Ĝis nun botanikistoj ne scias klare, ĉu temas pri floroj aŭ floraroj. Polenigo okazas per akvo, frukto estas kapsulo.

La lemnoj formas la familion de **lemnacoj** (ĉeĥe "okřehkovité"). Ĉe ni kreskas kvin specioj. La plej abunda estas **malgranda lemno** (fig. 1 - ĉeĥe "okřehek menší"). Ĝia folieto estas ovoforma, 3 mm longa kaj 2 mm larĝa, kun unu radiketo. Ĉi tiu specio kreskas ĉie sur la surfaco de stagnantaj kaj malrapide fluantaj akvoj en ĉiuj kontinentoj. Simila kaj malpli ofta estas **ĝiba lemno** (fig. 2 - ĉeĥe "okřehek hrbatý"), kies folieto havas konveksan malsupron. **Trisulka lemno** (fig. 3 - ĉeĥe "okřehek trojbrázdý") havas folietojn lancformajn, longajn 10 mm kaj larĝajn 4 mm, kaj kreskas kelkajn milimetrojn sub la surfaco de la akvo. Ĝi estas malpli ofta ol malgranda lemno. **Spi-**

rondelo (fig. 4 - ĉeĥe "závitka mnohokořená") havas rondforman folieton kun diametro 8 mm, ruĝetan malsupron kaj kelkajn radiketojn. La spirondelo abundas sur stagnantaj akvoj. La kvina specio estas **volfio** (fig. 5 - ĉeĥe "drobníčka bezkořená"). Ĝi estas la plej malgranda el ĉiuj lemnoj, sekve ankaŭ la plej malgranda floranta planto: globetformaj floroj, milde longformaj, longaj 1 mm, sen radiko, kun nur unu pistilo kaj unu stameno. La volfolio kreskas en suda Eŭropo, ĉe ni oni povas trovi ĝin en suda Moravio, kien ĝin alportas birdoj. En nia lando tiu ĉi specio kreskas nur en somero.

La lemnoj estas strangaj, sed tre interesaj plantoj. Ni povas trovi ilin preskaŭ sur ĉiu fiŝlago aŭ marĉlago. Ili estas konataj sub popola nomo "žabinec" (= ranejo).



La neologismo "gaĝo" - kontribuaĵo al la Esperanta slango

Bernard Golden

La homonima radiko "gaĝ-"

Jozefo Major, la redaktoro de **Nov-Zelanda Esperantisto (NZE)**, prikomentante artikolon de Giorgio Silfer pri neologismoj en **Literatura Foiro** (n-ro 123, 1990, pĝ. 24-26), skribis jene pri la vorto "gaĝo".

"Silfer ankaŭ diras, ke "gaĝo" (neesperantisto) estas **esperantismo**, sed laŭ mi ĝi estas simpla eraro, ĉar ĝi troveblas en la Suplemento de PIV kun la senco de **garantiaĵo**" (NZE, n-ro 495, 1990, pĝ. 3).

Efektive, ne Silfer sed Major eraris. La redaktoro de NZE tiris malĝustan konkludon, ĉar li ne konsideris jenajn du logikajn eblojn.

1. Ne ĉiuj vortoj kaj signifoj de la daŭre evoluanta Esperanto estas registritaj en **Pleina Ilustrita Vortaro** (PIV, 1970) kaj ties **Suplemento** (PIVS, 1987).

2. Ekzistas en Esperanto homonimaj radikoj, t.e. radikoj kun la sama skribo kaj prononco, sed kun malsamaj devenoj kaj signifoj. Ekzemploj estas la sekvaj paroj:

a. **boks/o**: 1. arto de pugnobatalado; 2. fiŝo el la subordo de perkoformaj fiŝoj

b. **fon/o**: 1. efektiva ebena parto, el kiu io elreliefiĝas; 2. decibelo

c. **pes/o**: 1. ago de tiu, iu pesas; 2. monuno de diversaj Sudamerikaj landoj

"Gaĝo" estas ĝuste tiuspeca vorto, kies du signifoj rezultas de malsamaj etimologioj. La vorto "gaĝo", kiun redaktoro Major citis el PIVS, estis enkondukita en Esperanton de Gaston Waringhien. Ĝia etimo estas la franca substantivo **gage** (elp. gaĝj), signifanta garanti-aĵon. La dua "gaĝo" estis enkondukita de Giorgio Silfer kun la signifo "neesperantisto". La

tasko nun estas spuri la originon de tiu "gaĝo".

La etimologio de "gaĝo" (neesperantisto)

Estas ja strange, ke la redaktoro de NZE nek vidis nek aŭdis similecon inter tiu ĉi "gaĝo" kaj vorto en sia gepatra lingvo, la hungara. Temas pri **gádzsó** (elp. gaĝo), kiu apartenas al la slanga lingvotavolo de la hungara kaj signifas: 1. ulo, persono; 2. cigano, precipe viro; 3. kamparano (**Vortaro de fremdaj vortoj kaj esprimoj**, pĝ. 286). En tiu ĉi vortaro **gádzsó** estas signita kiel slanga vorto de cigana deveno.

La etimologio de la hungara vorto "gádzsó"

Ankoraŭ unu paŝo en la esploro kondukos al la etimo de **gádzsó** en la cigana lingvo; ĝi estas **gagé** (elp. gaĝe) kaj signifas neciganon. Ilustrajo de la uzo de "gaĝo" en cigana kunteksto troviĝas en la sekva citaĵo:

"Kiam cigano forlasas sian dialekton, li ne adoptas aliajn formojn de **romanés**: al la forgesita dialekto sekvas la lingvo de la gaĝoj" (Sergio Franzese, "La cigana literaturo", **literatura Foiro**, n-ro 112, 1988, pĝ. 23-28; citaĵo sur pĝ. 24).

Legantoj de la verkoj de Gerge Borrow pri la ciganoj en Britio eble memoras, ke li uzis la vorton **Georgio** (elp. GORĝio) por necigano. Ĝi evidente havas la saman devenon kiel "gaĝo".

La unua cigandevena Esperanto-vorto

"Gaĝo" plej probable estas la unua vorto en Esperanto de cigana deveno. Giorgio Silfer, en sia artikolo citita ĉi-supre, klarigas, ke "gaĝo" es-

tas neologismo, kiu apartenas specife al la Esperanta soci-sfero, do ĝi ne estas tradukebla al etnolingvoj, escepte de tiuj, kiuj posedas analogan formon por esprimi la malsamecon de la neminoritato kompare kun la minoritata diasporano (pĝ. 26). Analoga vorto estas la hebredevena "gojo", kiun judoj uzas por nomi nejudon (PIV). Kelkfoje "gojo" estas uzata same kiel "gaĝo" por nomi neesperantiston.

Ciganlingvaj kontribuajoj al la leksiko de etnolingvoj

La ciganoj, kiuj originis en la norda Hindio, disvastiĝis ekde la 11-a jc. Kiel nomadoj ili unue enpenetris en multajn eŭropajn landojn kaj poste iris transmaren al Ameriko. Ilia origina lingvo, parenca al la hindeŭropaj lingvoj de norda hindio, displitiĝis en plurajn dialektojn pro la influoj de la lingvoj de la landoj, kie la ciganoj migradis kaj setlis. Samtempe okazis lingva prunto, kaj lingvoj en landoj, kie estis sufiĉe granda nombro da ciganoj, alprenis ciganiajn vortojn. Tiuj ĉi ĝenerale apartenas al la slango aŭ al la ŝtelistlingvo, kiel *rotwelsch* en Germanio. En Hungario vortoj de cigana deveno estas nuntempe uzataj en la ĉiutaga konversacia lingvo, kaj oni apenaŭ sentas, ke ili estas fremdaj. Jen kelkaj ekzemploj:

- **csávó** (elp. ĉavo) - knabo
- **csáj** (elp. ĉaj) - knabino
- **anusz** (elp. manus) - homo, viro
- **csór** (elp. ĉor) - ŝteli
- **lóvé** (elp. love) - mono
- **csóró** (elp. ĉoro) - malriĉa
- **dilis** (elp. diliŝ) - freneza
- **dumál** (elp. dumal) - babiladi

Ĉu kelkaj el tiuj vortoj havas ŝancon esti uzataj kiel slangaj vortoj ankaŭ en Esperanto laŭ la precedento de "gaĝo"?

Rimarkigo de la redaktoro:
Jam penetras en Esperanton la propra nomo de la cigana etno, **romao**, dum la vorto **cigano**, donita al ili de Eŭropanoj, estas ĉiam pli sentata kiel ofendo kaj tial rifuzata.

TOLKIEN PRI ESPERANTO

(Tolkien estas nun tre populara furor-aŭtoro en la mondo kun siaj fantaziaj romanoj *La Hobbitoj* kaj *La Sinjoro de la Ringoj*)

Kelkaj el vi eble aŭdis, ke antaŭ unu aŭ pluraj jaroj okazis kongreso en Ok-sfordo, kongreso de Esperanto; aŭ povas esti, ke vi ne aŭdis. Mi persone estas kredanto je "artefarita" lingvo, ĉiukaze por Eŭropo - kredanto, ke ĝi estas dezirinda kiel necesa antaŭkondiĉo por unuigo de Eŭropo, antaŭ ol ĝi estos glutita de ne-Eŭropo; samkiel pro multaj aliaj bonaj motivoj - kredanto pri ĝia ebleco, ĉar la historio de la mondo montras, laŭ mia scio, kreskon de homa reguligado (aŭ influado) de neregulaj lingvoj, kaj progresantan disvastiĝon de vico da pli malpli uniformaj lingvoj. Ankaŭ mi speciale ŝatas Esperanton, precipe ĉar ĝin kreis unu viro, plie ne-filologo, kaj ĝi estas io kiel "homa lingvo senigita de maltaŭgaĵoj kaŭzitaj de tro multaj sinsekvaj kuiristoj" - kio estas la plej bona priskribo de ideala artefarita lingvo, kiun mi povas doni.

J.R.R. Tolkien
(el "A Secret Vice" en *The Monsters and the Critics and Other Essays*)

Nia vojaĝo komenciĝis triope. Mia edzo estas ne-esperantisto, sed nura simpatianto al la lingvo. Tio estas lia kutima sinprezento. Li memlernis la lingvon, ĉar li ne ŝatas esti lernanto de sia edzino, kaj legis la librojn "Esperanto en kvar semajnoj", "Vivo de Zamenhof" de E.Privat kaj aliajn plurajn. Mia filino Madoka estas 16-jara, de la lasta jaro kursano de Jokohama Esperanto-Rondo. Mi kaj la du kune vojaĝis ĉisomere.

En la 21-a de julio 1992 ni ekflugis de la internacia flughaveno de Tokio. La 22-an matene ni atingis Svislandon. Dum la tago ni promenis en la ĉefurbo Bern kaj vespere trajne veturis ĝis La Chaux-de-Fonds. Ni prenis taksion al Kultura Centro Esperantista. La 25-an de julio frumatene ni foriris de La Chaux-de-Fonds per internacia ekspreso Euro City, kiu kuris preter lago, kampoj, pastejoj, kaj tra urboj, vilaĝoj. Ni atingis Vienon vespere je la 6a kaj duono.

La 77-a universala Kongreso de Esperanto estis tia, kian oni jam raportis en diversaj eldonaĵoj aŭ kunvenoj. Mia familio aliĝis al la postkongresa ekskurso organizita de Esperanta Vojaĝ-Servo. La karavananoj estis 34, plej multaj el Usono, aliaj el Britio, Nederlando, Germanio kaj ni tri el Japanio.

La karavana vojaĝo daŭris 10 tagojn. La unuan tagon posttagmeze nia privata buso foriris de Vieno (post UK 92 - noto de red.), vespere trans la landlimon alvenis al Bratislavo en Slovakio, iama ĉefurbo de Hungario. En la sekvaj tagoj ni ĝuis la belajn ĉefurbojn Budapeŝto kaj Prago, kaj vizitis en Poprado slovakon Esperanto-Centron, kiu havas sian

domon kun oficejo, lernoĉambroj, ankaŭ tranoktejon por 60 personoj.

La 9an tagon, en Tábor, malnova militurbo, ni adiaŭis la karavanon kaj veturis al Brno por viziti nian amikinson, s-s-inon Jarmila Handlova.

De Tábor ĝis Brno ni solaj veturis per buso kvar horojn. La karavanvojaĝo estis kompreneble bona, sed ankaŭ veturado per loka buso estis same interesa kaj komforta. La buso havas ne nur sidlokojn por homoj, sed ankaŭ ŝarĝospacon, kien oni metas pakaĵojn, korbajn de rirkoltaĵoj, ladbotelegojn, kaj eĉ biciklon. Iom post iom tie pakaĵoj multiĝas, ili intermiksiĝas laŭ veturskuo. Jam mankas la spaco. Novaj veturantoj metas la sian sur alies pakaĵon. Ankaŭ sur niaj valizoj kuŝas grandaj florfaskoj.

Dum ni estas kun esperantistoj, ni rilatas egale inter ni kiel familianoj en la propra domo, sed dum ni vojaĝas solaj, mia edzo fariĝas la reprezentanto de nia grupeto. Se ni renkontas neordinaran aferon, li serĉas angla-parolanton, kaj la afero solviĝas. Dank' al tio mi ja povis esti ĉiam trankvila, sed aliflanke al mi mankis aventuro.

Ĉe la bushaltejo de Brno atendis nin s-ino Handlová. En 1990 ŝi venis al Japanio kaj tiam invitis nin al la 77a UK tiutempe planita en Ĉeĥoslovakio. Sia tiama invito estis deirpunkto de nia vojaĝo.

Dum ni vojaĝis, varmeĝaj tagoj daŭris en Eŭropo. S-ino Jarmila Handlova diris, ke legomkampoj fariĝis tute sekaj. Ŝi havas sian loĝejon en la urbo Brno kaj ankaŭ en kamparo, kiu situas 40 kilometrojn sudoriente de la urbo. Ni gastis du noktojn en la urbo kaj unu nok-

ton en la kampara domo.

Ni alvenis al Brno en la malfrua vespero de la 9a de aŭgusto. en la sekventa tago gvidate de Jarmila ni turismis en kaj ĉirkaŭ la urbo, ankaŭ butikumis bestetojn el bohemia kristalo. Vespere, malgraŭ la feria sezono, ŝi aranĝis por ni renkontiĝon kun teo kaj kukoj manfaritaj de la grupaninoj. En ĝi partoprenis dekkelke da esperantistoj. Tie Madoka unuafoje renkontiĝis kun sia korespondantino.

La 11an tagon ni veturis al la kampara domo, kie Jarmila nutras dombestojn kaj prizorgas vitejon kaj legomkampojn. Madoka karesis la idojn de la kuniĝo kaj ni kune deprenis tomatojn kaj en kuirejo mi helpis fari ovajon. La ovŝeloj estis tiel fortikaj, ke ili ne fendigis per unu frapeto, kiu facile malfermas la ovon ĉe ni. Krome la ovoflavo en la fortika ŝelo estis densa kaj la koloro estis eĉ pli ol flava. Mi vidis ŝin premrompi per manprenilo ostojn de kokajoj kaj porkajoj, kaj doni rompitaĵojn ostaĵojn al la kokinoj. Kia cirkulado! Mi multe lernis de ŝia vivo. Ŝi utiligas ĉion.

Havlik, esperantista amiko de Jarmila, veturigante sian aŭton, montris al ni la kamparan regionon. Sur monteto ni vidis belegan panoramon de vitejo, kiu etendiĝas en larĝa ondumo ĝis la horizonto. Li gvidis nin al suk-fabriko, kie li laboras. Li, ŝercema prezentis nin al la kolegoj, ke venis japanoj por aĉeti ĉi tiun fabrikon. La influon de la socia reformiĝo en Orienta Eŭropo mi aŭdis kaj vidis en individuaj vivoj, sur urbaj stratoj kaj nun tie en la fabriko. Survoje ni vizitis la vinkelon de lia frato, kie ni ricevis vinon per historie interesa transgutigilo, ankaŭ du grandajn kelojn, kie kuŝas ne kalkuleble multaj

vinbareloj malnovaj kaj novaj. En malvarmeta kaj obskura koridoro, de loko al loko oni metas glasetojn por gustumi. Ĉiuloke li verŝis vinon en kvar glasetojn. Mi vidis, ke mia edzo, vino-amanto, plej ĝojis pro la vizito. Ankaŭ Madoka profitis la okazon, ĉar en Japanio nematuraj homoj estas leĝe malpermesitaj trinki alkoholaĵojn.

Vespere en la domo de Jarmila, Havlik kaj lia bulgara amiko esperantista kaj mia familio, manĝis kolbason rostitan per fajro, babilis, kaj kantis sidante aŭ kuŝante ĉirkaŭ la fajro. Ankaŭ la hundo de Havlik tutan tempon estis kune en nia rondo.

La 12an de aŭgusto ni forveturis el Ĉeĥoslovakio.

(laŭ la artikolo de s-ino Hirose en jokohama gazeto "Novaĵoj tamtamas")

MARK TWAIN KAJ ESPERANTO

Kiam al tiu ĉi mondfama aŭtoro S.L.Clemens, nomata Mark Twain, skribis tradukinto de lia bonhumora rakonto, petante permeson publikigi la tradukon, estis ricevita jena angle skribita respondo: "Se mi estus pli juna je kelkaj jaroj, mi lernus tiun lingvon. Eventuale mi lernus ĝin eĉ nun, se mi estus certa, ke ĝin parolas la anĝeloj."

(Laŭ artikolo el *Bohema Esperantisto*, 1909 - rim.: en la jaro 1910 Mark Twain mortis)



Rudolf Těsnohlídok: Vulpino Ruzulino (sesa ĉapitro)

trad. M. Malovec

La arbaro estis granda, dezerta kaj mistera. "Kiaĵo nun plu?" pensis Ruzulino. "Mi ne konas la padojn. Mi ne scias kien ekceli. Malgajo min premas. Kial mi estas tiom sola? Se almenaŭ tegmenteto ŝirmus mian kapon!"

Subite ĉia nostalgio deglitis de ŝia koro. Ŝi ne plu estis sola. Besta persono, al ŝi nekonata, staris antaŭ ŝi ĝiszone en truo. La starado ne estis danda nek vagabonda, sed male, el la pozo, el ĉiu haro, el la okuloj firmamenten direktitaj, el la nazo nobele suprenlevita kaj el la majesta antaŭtenado de la antaŭaj piedoj radiis senmezura supereco super la vasta ĉirkaŭaĵo. Ruzulino kaŭriĝis post vepro kaj tute konsternite diris al si en la animo:

"Fulmo min kisu! Kian pajacon mi vidas?"

Li estis moŝta sinjoro melo, domposedanto, neĵuna fraŭlo kaj eksa imperiestra konsiliano en la arbara regno. Li vestis sin serioze, malatentante ekstravagancojn de la modo, kaj lia cindrokolora, heredita surtuto havis fasonon ne tro elegantan, sed oportunan, kvazaŭ fanditan laŭ lia figuro, precipe laŭ lia barelmajesta ventro de elektema gastronomo kaj ĉiovora frandemulo.

Li observis la veteron. Sekvante la flugon de kuloj, libeloj kaj vanesoj, li konvinkigis, ke la barometro rapide falas kaj ke venos verŝajne fulmotondro. Tial li decidis prizorgi gravan korpan neceson, por ne bezoni sub pluvo transpaŝi la sojlon. Farinte la farenadaĵon, li denove malaperis en sia truo.

Ruzulinon obsedis scivolemo. Ĉar ŝi ne konis la kutimojn kaj morojn de la arbara loĝantaro,

pri deca traktado kun birdoj, rampuloj kaj aliaj bestoj ŝi posedis eĉ ne plej etan ideon kaj ĉar ŝi kutimiĝis al vulgaraĵaj malvirtoj homaĵ, ŝi proksimiĝis al la mela fenestro kaj enrigardis kiel homo, kiu ankaŭ tre emas enŝovadi la nazon en fremdan vazon. Pro mirego faŭkigis Ruzulino sian buŝon, vidante la luksan salonkameron kaj en ĝi la mastron sur valora kuŝejo, ĝuantan fumadon el longa pipo. Ŝi ne kapablis reteni ŝrikon de miro.

"Kiu ŝrikas ĉi tie?" diris la melo kaj transruliĝis sur la alian flankon.

"Mi, moŝta sinjoro," respondis bonkondukte la vulpino.

"Vi feĉo almozula, pulojn portanta! Mi ekzemplos vin! Ĉesu okulaĉi!" li diskriis en kolero, forgesante respekton al propra persono.

"He, he," ekridis la vulpino, "insultaĉu laŭplaĉe. Via lango pigras. Parolo ŝvitigas vin kiel viŝtukon. Rigardu, kara mondo, la moŝtsinjoron, li sterniĝis en sia domego, en kiu povus loĝi tri, kaj insultas povrulinon nur pro tio, ke ŝi volas lin rigardi. He, he, li kuŝas kiel bovo ripozanta sur herbejo kaj min li volus ĉaspli. He, he, ne eblas!"

"Mi instruos vin ne ridaĉi antaŭ mia domo! Marŝ! Forpafiĝu! Aŭ mi transdonos vin al advokato, kiu pelos vin antaŭ tribunalon."

"Servu vin laŭplezure," sarkasme diris la vulpino kaj moke levis la voston.

En tiu momento forlasis la melon lia denaska pigremo. Li ekkaptis balailon kaj vip! vip! ŝin; post ŝiaj oreloj ekŝvelis kolbasoj, tiel li vipegis ŝin. En panika surprizo ŝi saltis en dornoplenan vepron kaj gratvundis sin. Furioze ŝi kunpremis

la dentojn, kaj eksidinte nun estis ŝi, kiu komencis insulti.

"Vi putra melono, brutallo bestia, murdisto-masakristo, ĉu mi tiom ĝenas, ke vi draŝas min? Tedaŝ vin mia ekzisto, ŝlimulo makulita, ke vi pistas min? La arbaro grandas, sed la moŝtsinjoro ekkapricas, ke neniu rajtas preter lia ĉirkaŭfekita fenestro. Mi devus transdoni vin al la glora tribunalo, sed kiu vadus pro vi en ŝlimo. Vi ne valoras la penon. Sed sciu, ke mi ne lasos la aferon trankvila, eĉ se nova diluvo minacas. Tuj mi iras al la apartamenta komisiono. La sinjoroj jam klarigos, ĉu vi rajtas pufiĝi en la trogloditejo. Kaj kiam ili elkaŝigos vin kaj forekspedos, vi komprenos mem, kiel gustas havi nenian tegmenton super la kapo, vi fiulo stupida."

La melo malsupre aŭskultis nur duonorele. Li dormemis.

"Nu, ŝi krii ĝissate. Virinon mi ne superkrios, do preferu silenti," li diris al ŝi, rebruligante la estingitan pilon. Sed la vulpino ne ripozis kaj diligente meditis, per kio lin ĝisoste kolerigi. Kaj rememorinte pri lia luksa apartamento kaj ke domaĝus treniĝi de kancelario al kancelario ĝemegante ĉe la apartamenta komisiono, ke oni konfisku la mas-trumejon de la melo, ŝi decidiĝis konfiski ĝin per propraj fortoj.

"Ĉe sinjoraĉoj vi nenion atingos, ili lasos sin subŝmiri. Li sendube jam delonge ne estus domposedanto, se li ne subŝmirus."

Ruzulino trovis nekutiman esprimiĝon de malrespekto kaj venĝo samtempe. Ŝi oportune alkaŭriĝis, levis piedon kaj komencis la melon bombardi.

"Jen vi havas, ŝimulo, sur via moŝta kapo. Kaj se ne sufiĉas, mi tuj liveros novan porcion. Vi povas ĉion kolekti por



viaj marĉandaj negocaĉoj. El via majesta palaco, sciu, mi faros mian la ...- mi pardonpetas ...trinon, kaj se vi intencas eljeti mian donacon, surprenu glaceajn gantojn, por ke viaj ungoj ne trempiĝu. Ili estas tro fajnaj." Ŝi jubilis pro sia venĝo. La melo malsupre suferis infere. Suprenfaldinte la manikojn, li demetis la puntajn manumojn kaj komencis la malagrablan laboron. "Ĉiun pecon turnu, returnu kaj priblovu malvarmige. Ĝi ardas kaj brulvundigos viajn manojn. Jen vidu, vi scias tion, vi povus al Brno labori, ili serĉas balaiston. Ĉu kaloj jam elsaltis?"

Kaj la melo malsupre laboregis en sia loĝejo, kovrita de ŝvito kaj pikata sub la ripoj. Lia nobela orgoĵlo kaj digno

lin komplete forlasis.

"Aĉulino malĉasta, senmorala," li lamentis, "per komisiono min minacas, insultas min kaj fine turnas mian apartamenton en publikan necesejon. Mi atendas momenton, ĝis ŝi foriros, kaj poste mi kovros la fenestron."

Elĵetinte la pruvaĵojn de la malnobla vulpa venĝo, li denove komforte sin aranĝis en sia kuŝejo, ŝtopis la pipon kaj ekmeditis. Li riproĉis sin mem, kial li jam antaŭlonge ne foriris el ĉi tiu kabano.

"Kaj kial ne edziĝi," ekpensis la melo kaj eĉ ne rimarkis, ke li parolas voĉe al si mem. "Bela peco da virino ne malutilus."

"Vin iu dezirus edziĝi al si," aŭdiĝis mokado super lia kapo. "Kiom vi estas ĉe la zono dikega kiel barelo, tiom vi estas en la kapo malsaĝa kiel pantoflo. Jen vi havas belan peco da virino, por ke vi sciu, ke mi estas donacema."

Li konsterniĝis kaj rekonsciinte el la mirego, li estis malseka de la kapo ĝis la piedoj. Eĉ dum plej impetaj pluvegoj neniam okazis al li io simila. Terurita li ĵetis rigardon supren kaj ekvidis Ruzulinon en pozo tre, tre intima kaj delikata. Tio jam transpaŝis ĉiujn limojn. Profunde ekscitita li lastfoje ĉirkaŭrigardis en sia amata ĉambro kaj energie forkraĉis. Sekiĝis sian larmon, pakis siajn aĵojn kaj eliris el la loĝejo. Post la vepro kaŭris Ruzulino kaj rideĝis plengorge. Li fiere forturis la nazon kaj kuraĝe ekpaŝis en la arbaron.

Ruzulino plukis sekan herbon, revenis al la forlasita loĝejo, balais la kuŝejon, venke svingis la voston, ĝoje ekkantis kaj komforte aranĝis sin en la lito. Post momento ŝi jam dormis kvazaŭ en kusenoj. Unuafoje en propra dormoĉambro.

Skolta invito:

Skolta Esperanto-Ligo en Slovakio aranĝas de la la ĝis la 8a de aŭgusto 1993 internacian renkontiĝon, en la agrabla montara ripozejo, proksime de la ĉefurbo de Slovakio, Bratislava, en la vilaĝo Pila sub la kastelo Červený Kameň (Ruĝa Ŝtono).

Loĝado en la dulitaj ĉambroj de altnivela hotelo Hydrostav. Bona manĝado - trifoje tage, ĉiutaga interesa turisma programo, vesperaj kursoj de Esperanto, amuzo, kantado, tendarfajroj, internacia medio, skolta frateco. tenisludo, pilkoludo, arkapafado. Apartaj programoj por infanoj, se gepatroj partoprenas alian programon. Eblas partopreni aŭtobusajn ekskursojn al Bratislava, al Vieno kaj al Budapeŝto.

Unusemajna kotizo por 1 persono: DEM 160,-. (por loĝantoj en turisma hotelo kun kvarlitaj ĉambroj: DEM 120,-).

Aŭtobusaj ekskursoj:

- al Bratislava 10 DEM
- al Vieno 20 DEM
- al Budapeŝto 30 DEM.

En la sama loko estas por vi preparata **ORA SKOLTA AŬTUNO** en la lasta semajno de oktobro kaj en novembro 1993. Vi povas trovi ĉi tie agrablan ripozon dum 1 ĝis 3 semajnoj. Ĉe 2-semajna restado vi ricevos rabaton 5%, ĉe 3-semajna 10%.

Krome vi kiam-ajn trovos en Pila ripozlokon sen partopreno en skolta programo: loĝado kun tuttaga manĝado en la hotelo Hydrostav: DEM 17,- po tage por 1 persono; por la samo en la turisma hotelo: DEM 12,-.



HYDROSTAV - PÍLA



Český esperantský svaz
110 01 Praha 1, Jilská 10

* * * STARTO * * *

Nepřavidelný věstník Českého esperantského svazu. Vychází 6x ročně. Je určen členům svazu. Odpovědný redaktor: **Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno.** Administrátor: **Karel Daněk, box 425, 660 25 Brno 2.**

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Aperas 6-foje jare. Respondeca redaktoro: **Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno, Ĉeĥoslovakio.** Administratoro: **Karel Daněk, poŝta kesto 425, 660 25 Brno 2, Ĉeĥoslovakio** Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia asocio. Abonprezo: 14 guldenoj.

NOVINOVÁ ZÁSILKA

Povoleno JmŘS Brno:

Č.j. P/3-8847/91 ze dne 28.8.1991

Podávací pošta:

664 03 Podolí u Brna